

Usona Esperantisto, n-ro 2013:1

- **anoncoj**

Forpaso de Frank P. LOCKARD; vojaĝu al Rejkjaviko; novaj varoj en la libroservo

- **Omaĝe al Dori VALLON-WHEELER**

- **La kialo estas**

Poemo de Dori VALLON-WHEELER, kiu forpasis en Novembro, 2012. Ĝi estas la sola verko de usona poeto kiu aperas en la fama *Esperanta Antologio* de William AULD.

- **Ni povas leviĝi per kompreno de la homa naturo**

Ĉu iam vi konvinkiĝis pri tio, ke la lingvo ne kreskas, ne disvastiĝas sufiĉe rapide? Ni ne publikigas nuntempe tiom da paperaj revuoj kaj bultenoj kiom aperis, antaŭ kvardek jaroj, kaj jen pruvo de la baldaŭa disfalo de la verda templo. Tia konkludo, ke Esperanto stagnas aŭ malkreskas estas simple senbaza kaj eĉ malprudenta...

- **Mia malkovro de Japanujo (tria parto)**

La tria parto de nia serio. Ĵenja rakontas siajn aventurojn en Ŝikokuo, ĉe la ĉefoficejo de Swany, kaj en Kobeo.

- **Considering the languages students already speak**

It's possible to teach a foreign language without taking into account the languages one's students already know. But the language(s) a student already speaks can hinder or help learning a new language.

- **Solvo de n-ro 2012:5**

- **Spot It!: simpla kartludo**

Spot It estas rapida kartludo kun tre simplaj reguloj. Ĝi do bonas por esperantaj renkontiĝoj.

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldonato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.



anoncoj

Forpaso: Frank P. LOCKARD

Nia membro Frank P. Lockard forpasis la 22-an de Augusto, 2012 en Hartford, Konektikuto. Li havis 93 jarojn. Lian forpason anoncis la ĵurnalo *Hartford Courant* [<http://goo.gl/IK69M>].

Vojaĝu al Rejkjaviko

Ekde 1969, Lusi HARMON de la Esperanta Vojaĝ-Servo (EVS) organizas internaciajn ekskursojn al Esperanto-aranĝoj. Ŝi nun organizas flugojn al la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Islando de la 20-a ĝis la 29-a de Julio. Ŝi ankaŭ planas almenaŭ tri-tagan visiton al Gronlando.


Detaloj baldaŭ haveblas; se vi interesiĝas, nepre petu de ŝi aliĝilon. Lusi preferas paperan poŝton, sed se necese, vi povas peti ankaŭ elektronike.

Lucille Harmon, 2389 Thackeray Dr., Oakland, CA 94611 aŭ
<lusiharmon@esperanto.org>.

Novaj varoj en la libroservo

HOUSE OF GHOSTS Christopher R. Mihm

Domo de Fantomoj is Christopher Mihm's seventh movie and first supernatural thriller. A classic horror film in the B movie genre with Esperanto dubbing and subtitles, courtesy of George Baker and many volunteers from around the world. DVD. 77 mins. 190x135. 2012. USA. 7-41459-28018-5. **\$7.40.** (link) [<http://goo.gl/pEQM7>]



THE UNIVERSAL LANGUAGE Sam Green

A 25-minute documentary about Esperanto by filmmaker Sam Green, who conducted interviews with speakers at recent World Congresses. This is the second of two documentaries — the first, *Utopia in Four Movements*, premiered at Sundance and was very well received. DVD. 28:30 mins. 190x140. 2011. USA. **\$25.50.** (link) [<http://goo.gl/3Detg>]



BOOK CATALOG

A catalog of all the books and CDs available in the online store. Useful for those who do not have regular access to the Internet, or who simply prefer to browse the catalog on paper. 63 pages. 280x220. 2012. USA. 9781477630365. **\$5.40** (link) [<http://goo.gl/xN2HD>]



LA PRINCO ĈE LA HUNOJ Eugene DE ZILAH

Rakonto pri la huniĝo de ĉina aristokrato, pri malfacila adaptiĝo de talenta individuo al alia civilizacio, al aliaj homoj, moroj, gustoj kaj odoroj. Mola bindaĵo. 611 paĝoj. 220x140. 2011. Usono. 9781595691880. **\$35.10** (ligilo) [<http://goo.gl/GHE9e>]



Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Due to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.

Omaĝe al Dori VALLON-WHEELER

Pasintnovembre forpasis nia kara Dori. Por helpi honori ŝian memoron, mi petis ke membro Lee MILLER kompilu kaj redaktu por ni kontribuojn pri ŝi fare de niaj membroj. Multan dankon al li pro la laboro. Se ankaŭ vi volas dividi kun ni memoron pri Dori, bonvolu sendi mesaĝon al <bulteno@esperanto-usa.org> (en la angla aŭ en Esperanto) por aperigo en la leterkesto. —Red.



Dori kaj amiko Ellen EDDY en 2007, ĉe NASK en Sandiego.

De Lee MILLER

Doris Vallon-Wheeler (“Dori”) mortis la 2-an de Novembro 2012, 86-jaraĝa. Ŝi estis instruisto en San Mateo, Kalifornio, kaj post la emeritiĝo estis konata inter usonaj esperantistoj kiel ĉiama partoprenanto en Landaj Kongresoj kaj aparte en la kursaro kiu nun nomiĝas NASK (unue en Sanfrancisko, poste en Vermonto, kaj poste en Sandiego). Ŝi studis ĉe NASK ĉiun jaron de 1969 ĝis 2010. En la lastaj jaroj ŝi ne ĉiam memoris la vojon de unu konstruaĵo al alia, sed ŝi ĉiam kapablis flue konversacii en Esperanto kaj bone sekvi la lecionojn...

Ŝi estis plena de ridoj kaj ridetoj, fortaj opinioj, entuziasmo, kaj amo. Krom homoj, ŝi amis librojn, kaj ĉiun jaron por NASK ŝi sendis grandan skatolon de libroj, por ke ŝi havu ilin kun si dum la kursaro. (Post ŝia morto, la libroj iris en la manojn de diversaj esperantistoj kiuj feliĉe ricevis ilin.)

Ŝi estas konata kiel la sola usona poeto kies verko estas en la *Esperanta Antologio*, redaktita de William AULD. Jen io pri la fono de la poemo, en ŝiaj propraj vortoj:

En Kalifornio (1980-1981) ni havis kunvenon ĉe urbeto apud la oceano. Kaj mi pli bone spertis la gravajn, lertajn kontribuojn de nia usona Ĉefdeligito, s-ro Donald PARRISH kaj lia edzino. Ili fakte estas amparo de kongresoj esperantistaj.

Mi admiris s-ron Parrish speciale ĉar li parolis Esperanton lerte, flue kaj bele. Mi fieris ĉar ni babiladis kunkune dum horoj.

Ili loĝis en urbeto Watts en regiono proksime al Los-Anĝeleso. Watts estis bone konata ĝuste tiam ĉar blankuloj kaj nigruloj ne kontente vivis kiel najbaroj, same kiel en diversaj usonaj urboj en tiuj jaroj.

Ges-roj Parrish decidis resti proksime al siaj nigraj najbaroj ĉar ili loĝis tie plenkontente dum multaj jaroj. Do ili revenis hejmen al Watts post la kongreso.

Post nelonga tempo en tiu jaro, Donald Parrish estis en sia propra ĝardeno kaj virino nigra mortpafis lin!

Cathy SCHULZE, mia kara Esperanta instruistino telefonis min. KIA TRAGEDIO! Por mi persone kaj por esperantistoj en Kalifornio.

Ĝuste tiam, mi instruis en elementa lernejo plenplena de nigrulaj kaj meksikanaj infanoj. Ni

ĉiuj studis kaj ludis kune harmonie.

Estis problemoj — sed ni ĉiuj studis kaj ludis familie. La lernejestro pensis mondiskale kaj subtenis min dum mi instruis Esperanton je la kvara nivelo al infanoj inter 9- kaj 10-jaraĝaj. Ili sendis kaj ricevis poŝtkartojn de ĉirkau la mondo. Mi fieris!

Iam Cathy Schulze telefonis min post la tragedia novaĵo pri la murdita Donald Parrish. Mi estis tiel profunde vundita en mia Esperanto-koro.

Poemo venis de, kaj en mia Esperanto-koro.

La poemo aperas en tiu ĉi numero.



De Ellen EDDY

Dori Vallon-Wheeler estis virino de paco, amo, kaj espero. Por mi, NASK kaj Dori estas ĉiam ligitaj. Mi unue renkontis ŝin ĉe SFSU en la 80-aj jaroj kiam ŝi estis la “oficiala” fotisto de la kursaro. Ŝi jam estis multjara aktivulo en la Esperanto-movado; mi estis komencanto. Sed dum la jaroj ni pli bone konatiĝis kaj ofte estis kune dum Esperantaj aferoj.

Mi lernis ke ŝi iris al Japanujo post la fino de la dua mondmilito por instrui la anglan. Tiu sperto donis al ŝi longdaŭran respekton kaj amon por la japanoj. Parte pro sia mondvida sinteno kaj sperto en Japanujo, ŝi estis dungita instrui en miksrasa lernejo en San Mateo, Kalifornio. Tiu tempo en Usono estis politike problemlena, sed ŝi sukcesis krei harmonion en la klasĉambro inter infanoj de diversaj kulturoj. Ŝi ankaŭ sukcese enkondukis Esperanton, kiu helpis malfermi la mondon al tiuj lernantoj. Eĉ post emeritiĝo, ŝi kaj ŝia edzo Roli instruis, ĉi-foje la anglan en Ĉinujo. Ŝia kono de Esperanto multe faciligis tiun aferon. La diraĵo “iam instruisto, ĉiam instruisto” ege taŭgis por Dori.

Ŝi amis la korelativojn kaj konstante instigis lernantojn uzi ilin. Tiu amo montriĝas en la poemo honore al ĉefdeligito al UEA, Donald

PARRISH, “La kialo estas...”. Dori amis preskaŭ ĉiun kaj konsideris sin kiel civitanon de la mondo. Ŝi ĉiam portis pinglojn de la mondo kaj similaĵojn kiuj montris tian amon.

Reciproke, ŝi estis amata de ĉiu. Ŝia partopreno en preskaŭ ĉiu somera kursaro de NASK dum 43 jaroj aldonis ne nur ŝian bonhumoron kaj facilan rideton, sed ankaŭ historion de la Movado en Usono. Kaj kiam ŝi ne plu povis ĉeesti la kursaron, ŝi daŭre plibonigis la enhavon per granda donaco de libroj. La neceso translokiĝi al malpli granda loĝloko donis la okazon donaci skatolojn da libroj al NASK kaj aliaj Esperanto-grupoj. Eble vi aĉetis kelkajn el tiuj libroj ĉe la Landa Kongreso en Teksaso lastan someron, aŭ ĉe NOREK en Vaŝingtonio en Septembro. Ŝia foto estas surgluita interne de la kovrilo. Vi havas bonan memoraĵon de kara amikino. Dori donis grandan parton de sia vivo al Esperanto kaj malgraŭ ŝia forpaso, ŝi restas en niaj koroj.



De Julie SPICKLER

Miaj memoroj pri Dori komenciĝis kiam mi unue partoprenis la someran kursaron, tiam ĉe SFSU, antaŭ ĉirkaŭ 15 jaroj. Mi ne certas, ĉu ŝi estis studento, aŭ ĉu mi renkontis ŝin dum festo ĉe Cathy Schulze. Ĉiukaze, ŝi bonvenigis min kaj estis evidente varmkora esperantisto.

Mi renkontis ŝin denove ĉe kelkaj Landa Kongresoj, sed nur post ŝia reveno el Vaŝingtono por loĝi en Kalifornio, post la morto de ŝia edzo, mi vere bone ekkonis ŝin, kiam mi ŝoforis ŝin al la monataj kunsidoj de SFERO. Ŝi rakontis al mi pri sia juneco en la malgranda kalifornia urbeto de Quincy, kie en la altlernejo ŝi lernis ludi la fagoton, kaj kie ŝi gajnis premion por skiado, kaj pri sia posteno en Japanujo post la dua mondmilito, instruante la anglan al japanoj.

Ŝi ankaŭ parolis pri la bona sorto per kiu ŝi eklernis Esperanton, kiam, post la fino de sia unua edziniĝo, ŝi estis dungita instrui en la elementa lernejo de San Mateo, kie la estro estis esperantisto, kiu kuraĝigis ŝin instrui la lingvon (kiun ŝi lernis kun helpo de Cathy kaj Vilĉjo

Schulze). Post multaj jaroj, longe post ŝia emeritiĝo, eksa studentino kontaktis min por demandi, kiel ŝi povus viziti ŝin. La vizito vere estis plezuro por Dori, kiu tiutempe jam komencis perdi kelkajn memorojn — sed ŝi bone rememoris la studentinon.

Interese, eĉ kiam ŝia memoro malboniĝis dum ŝi parolis la anglan, ŝajnis ke en Esperanto ŝi

memoris pli bone; neniam en mia sperto ŝi havis problemon kun la lingvo, kaj ŝi pensis pli klare ol kiam ŝia menso pensis angle.

Ŝi ĉiam estis tre dankema pro la helpo kiun ŝi ricevis post kiam ŝi ne plu povis konduki aŭton, kaj al mi estis plezuro kaj honoro ebligi al ŝi ĉeesti kunvenojn de la loka grupo.

La kialo estas

Doris VALLON-WHEELER

Jen la sola verko de usona poeto kiu aperas en la fama *Esperanta Antologio* [<http://goo.gl/3e9xH>] redaktita de William AULD. La poemon verkis Doris VALLON-WHEELER, kies memoron ni honoras ĉi-numere. Vidu la artikolon pri ŝi por pli da informo pri la tragedia evento, kiu inspiris la poemon.

La kialo estas

Honore al D. E. Parrish, ĉefdelegito de Usono, kiu estis mortigita per pafilo de freneza nigrulino...

KIAL?

Jes, demandu kial!

Kial

iu dolĉa, kara, ege profunda
humila sindona samideano
devis morti tiamaniere... murde?

Demandu kial...

redemandu kial

En la demando

estas la respondo

En la demandvorto

estas la respondvorto

Jes... en Esperanto

Kial enhavas la vorton *i a l*

ial estas parto de kial

Ial...

ial iu, kiu kredis
ke homoj povas ami
unu la alian

iu kiu kredis

ke la barieroj povos fali

iu kiu kredis

ke ni ĉiuj estas anoj de
unu granda rondo familia

iu kiu vivis fratece

ĉi tiu frato mortis

terure en la nuno...

Ial...

ial tiu frato estis blanka

ial tiu frato estis proksima

ial tiu frato estis tie

Ial...

ial tiu frato mortis

ĉar li vivis en ne ekster la
centro de la nuno

Ial...

ial ni malamas la alian

ial ni tranĉas for

niajn homarajn ligilojn

ial ni rigardas nur

niajn haŭtojn... niajn eksterajojn

ial ni batalas

fratoj kontraŭ fratoj

Konstante frapas

la ialoj

Konstante frapas

la humiligoj

Konstante frapas

la malhonorigoj

Konstante frapas

la malnobligoj

Konstante frapas

la malestimigoj

persiste

obstine

ade

Ĉiuj rigardas ĉiujn

multaj rigardas nur

ekstere

multaj rigardas suspekteme

multaj rigardas timeme

multaj rigardas haŭtnivele

Ial...

jes, la kialo estas!

Kiu aŭ Kial?

Multaj demandos kiu

Kiu ĝin faris

kiu... kiu?

Ĉu eble pli multaj

demandos kial?

Mi esperas...

Kial?

Ĉu eble lia kulpo

estis lia blankeco?

Ĉu? kaj nia blankeco

Sed...

Sed... vi diras...

Mi ne povas regi mian haŭtkoloron

Mi neniam dolorigis

eĉ unu personon pro lia haŭtkoloro

Kaj plue vi plendas

Mi ne parolas kontraŭ ili

mi ne batalas kontraŭ ili

mi ne staras kontraŭ ili

mi amas ilin

mi ŝatas ilin

ILI?

Ĉiam ili devas esti ili

Ĉiam ili devas esti "tiuĵ aliaj"

Ĉar ili estas nigraj

Ĉu vi nun povas demandi kial?

Ĉu vi nun povas ne demandi kial?

Iel...

iel li sin demandis kial

iel li suferis kun siaj Nigraj fratoj

iel li sentis kunecon kun

siaj Nigraj fratoj

Kial?

Ni devas kompreni

Ni devas scii

Ni devas konfesi

ke la kialo estas

ke ni apartigas nin

unu de alia

kolore

kolore kolere!

Ni povas leviĝi per kompreno de la homa naturo

Orlando E. RAOLA

La kultura identeco de la tiel nomata Esperanta popolo, tiu soci-historia fikciaĵo al kiu ni ĉiuj ĉi tie sufiĉe komforte sentas, ke ni apartenas, staras pli grave ol la naciaj kulturoj surbaze de tradicioj, evoluintaj samtempe kun la lingvo. Ĉar mankas al ni batalejoj kaj generaloj fordonintaj siajn vivojn por la popola gloro; ĉar mankas al ni sanktejoj kie iu virgulino aŭ virgulo aperis elde la nenio je la plej bezonata momento, (kompreneble antaŭ la alveno de la tieaj televidaj skipoj); finfine ĉar mankas al ni tago de proklamado de sendependeco (La Krio de ...io esperanta ne troveblas), de naskiĝo de la patruja prapatro (bedaŭrinde neniam de la patruja prapatrino), aŭ eĉ tago de la forpaso, nature aŭ perkugle, de fondinto, liberiganto, ĉefministro aŭ partiestro, do ni kreis proprajn tradiciojn, inter kiuj plej gravas la ĉiujara kunveno por omaĝi la naskiĝon de Ludoviko Lazaro ZAMENHOF, la homo, kiu havis sufiĉan saĝon, kuraĝon, paciencon kaj plej grave, obstinon bezonatajn por elcerbigi projekton de helpa internacia komunikilo kaj en la daŭro de tridek jaroj (de la publikigo de la unua libro en Varsovio la 26-an de Julio, 1887 ĝis lia morto samloke la 14-an de Aprilo, 1917) flegi la evoluigon kaj fulmrapidan disvastiĝon tra ĉiuj kontinentoj de la terglobo de la maturiĝanta kaj esprimpova lingvo kiu elkreskis el tiu projekto, lingvo taŭga por satigi ĉiujn komunikajn bezonojn de la homoj tiutempaj kaj nuntempaj: la Internacia Lingvo Esperanto.

Ni ĵus tostis je la 153-a datreveno de lia naskiĝo, kaj la tosto fariĝas eĉ pli grava, ĉar naŭdek ses jaroj post lia forpaso, lia ideo kaj lia kreitaĵo daŭre vivas, bunte disfloras per rimedoj tute ne antaŭvideblaj en lia epoko, rimedoj kiuj certigas ĝian pluviadon en la estonteco, kaj kien alte ĝi flugos kaj per kiutipaj flugiloj ni ne kapablas eĉ bildigi hodiaŭ, ne eĉ la plej revemaj inter ni, inter kiuj ne hazarde abundas revemuloj.

Ni vivas en mondo konstante ŝanĝiĝanta. Tiu ĉi

fakto estis jam komuna scio inter la pragrekoj: Heraklito de Efeso ĉirkaŭ 400 jaroj antaŭ la komuna erao, agnoskis, ke ne eblas bani sin dufoje en la sama rivero, ĉar ĉiam ŝanĝiĝas la akvo kaj ankaŭ ĉiam ŝanĝiĝas la homo... Kaj se en la ŝanĝiĝemo de la mondo estas nenio nova, kio do estas nova? Kio frapus preskaŭ senkonsciige la tempovojaĝanton kiu, enirinte en tempomaŝinon post amika babilado kun Heraklito, elmaŝiniĝus hodiaŭ ie en la mezo de Eŭropo? Post multa cerbumado pri la afero, mi kuraĝas fari tri asertojn:

1. La tempovojaĝanto ege miros pri la sukceso de la nuntempaj teknikaĵoj, kiuj el ĉiu direkto brakumas nin polpe kaj faciligas nian vivon preskaŭ ĝis la rando de enuigo, per trukoj kaj mirindaĵoj malfacile distingeblaj de la tiama nigra magio.
2. Ili eĉ pli miros pri la netolereble rapida paŝo de ĉio ĉirkaŭ ili; aferoj kiuj iliatempe daŭris semajnojn nuntempe fariĝas kelksekundaj. Estas facile kalkuli kiom pli longaj niaj vivoj fariĝas pro tia akceliĝo, kiu kompreneble inkluzivas kreadon de novaj teknikaĵoj por plirapidigi la kreadon de novaj teknikaĵoj por plirapidigi. Sed la plej grava konstato estos...
3. Senrigarde de la novaj kontaktiloj por interrilati kaj de la novegaj maŝinoj por fari ĉiujn taskojn, kiuj iam sklavigis nin, la homo, la sentema, plorema, ridema, pensema, dubema, ŝercema, laborema, amuziĝema, pacema, batalema, amorema, la aminda kreitaĵo de la darvina evoluo daŭre estas kaj restas esence la sama, plena je la samaj bezonoj, timema je la samaj vivoturnoj, malsata je la samaj frandaĵoj kaj soifa je la samaj likvoroj: finfine, ke la tempo pasinta nur ŝanĝis la eksteraĵon sed ke la kerno restas

ĉiam la sama... Do, eble nur la rivero
ŝanĝiĝas...

Mi volas krome sugesti, ke plena konscio pri tiu ĉi fakto, pri la esence neŝanĝiĝebla naturo de la homo, povas multe helpi al kompreno de plej diversaj fenomenoj en la mondo entute, kaj en la mikromondo (ĉu mi pli bone diru *mondeto*) kiu estas la Esperanta movado. Tiu konscio povas provizi al ni utilajn ideojn por adaptiĝi, kompreni kaj kunlabori kun homoj kun kiuj ni dividas iun apartan interesiĝon (pri la lingvo, ekzemple) sed de kiuj ni malsimilas preskaŭ je iu ajn alia aspekto.

Sufiĉe multe da amuzaj (kaj ne tre amuzaj) ekzemploj venas en mian kapon se mi volus doni ekzemplojn: emo al sento de krizo kaj disfalo, perejo, frakasiĝo kaj timo pri malapero... nu, ili ĉiam estis kun ni, ili ĉiam akompanis kaj akompanas nin, ili estas ja parto de nia homa naturo, kaj ni tute homece esprimas tiujn sentojn, eĉ kiam la atenta okulo de sciencisto povus montri al ni la evidentan erarecon de nia penso.

Ĉu iam vi konvinkiĝis pri tio, ke la lingvo ne kreskas, ne disvastiĝas sufiĉe rapide? Ni ne publikigas nuntempe tiom da paperaj revuoj kaj bultenoj kiom aperis, antaŭ kvardek jaroj, kaj jen pruvo de la baldaŭa disfalo de la verda templo. Tia konkludo, ke Esperanto stagnas aŭ malkreskas estas simple senbaza kaj eĉ malprudenta: jen fakto kiu sukcesos pensigi vin alimaniere: hieraŭ kiam mi kondukis mian resanigan ekzercon por vidi, ke “tamen la afero progresas...” mi trovis 152 milionojn da retpaĝoj redonitajn de orakolo Guglo responde al la serĉvorto Esperanto. Kontentige. Kaj se vi konstatis, ke nun nur Havano daŭre elsendas Esperante per mallonga ondo, kaj ke jen la pruvo de la forvelkiĝo de la lingvo en la nuna jarcento, bonvolu pensi pli profunde por kompreni ke mallongonda radio simple malaperas poiome en ĉiuj lingvoj sub la plando de podkasto kaj retaj distribuejoj de aŭd- kaj video-materialoj. Kaj se finfine via loka klubo tro maljuniĝis, kelkaj forpasis kaj ne plu kunvenas, kaj tiel ĉio kolapsas nun, komprenu ke vi certe povos trovi milojn de horoj de interesa parolado Esperanta en *Youtube*, *Vimeo*, ktp, ktp., pli ol sepcent fadenoj en *Reddit*,

simile en la blogoj dise tra la reto, interbabili ĉiusemajne kun via vjetnama amikaro per Skajpo, ktp., ktp.

Ni venu al alia kampo por trovi ekzemplojn priparolindajn. Vi certe spertis la malfacilecon kunligi la volon kaj la fortojn de grupo de homoj por ekagi kaj sukcesigi komunan taskon, kio ajn ĝi estas. Tute ne gravas, ĉiam estas en grupo trikapa almenaŭ kvar opinioj kiel fari ion pli bone, pli rapide, pli malmultekoste. Kaj se almenaŭ du el la tri altestimas sin kaj kredas ke ili havas la kvalitojn kaj meritojn bezonatajn por fariĝi la grupestro... tiam vi havas konflikton, kiu ĝenerale inter la pacaj batalantoj povas fariĝi plenakra milito. Kaj la fortoj, kiuj povintus pli utile eluziĝi por bremsi la disvastigon de Volapuko, aŭ de vi-scias-kiu alia lingvo internacia, estas vane foruzitaj por longega diskutado, rivala al tiu de la dancantaj anĝeloj de la Akvinano: “ĉu ni havu la komitatanon B proponitan cent dudek tagojn antaŭ la kongresa estrarkunsido aŭ ĉu ni permesu ke la kandidatiga komisiono decidu kiam estu la lasta tago por transdoni la kandidatigajn petojn...” ktp ktp ktp *ad infinitum*... Pura kaj simpla homa homeco. Kion fari?

Mi suspektas ke mi ne estas tre originala se mi montras la vojon sekvendan: *La Vojo* kaj *La Espero*, la belaj zamenhofaj poemoj, enhavas sanigan dozon de saĝo kaj kuraĝigo, kaj indas mergiĝi en ilin de tempo al tempo. Ĉar li bone komprenis la defiojn kaj la etan ŝancon de la novnaskita lingvo pluvivi, la malfacilecon kreitan de la ekstera mondo ĉikananta, kaj eĉ tiujn kreitajn de la entuziasmoj mem (troa entuziasmo, troa ĵaluzo, troa memestimo)... Preter ĉio ĉi, ni povas levigi per kompreno de nia propra limigita homa naturo, de la homa naturo de niaj samideanoj kaj eĉ pri la homa naturo de niaj malsamideanoj. Tiel “En laboro paca ne laciĝu”... Iru “Obstine, antaŭen!/La nepoj vin benos/Se vi pacience eltenos.”



Cent-kvindek-jara pupo en Ŝikokuo... kiu servas teon!

Pri bonzo, gantoj kaj amo!

Trinkinte bongustan malvarman hordean teon, servitan de nia bela mekanika servisto, ni iras al la malnova gantofarejo, kie nun troviĝas muzeeto. Rigardante la malnovajn ilojn, estas malfacile imagi, kiel oni povas fari gantojn per tiom eta kudromaŝino, rulante la radojn per unu mano kaj tenante la kudraĵon per alia... kaj ĉio ĉi, kun duonmilimetra precizeco! Kiel klarigas nia bonkora ĉiĉerono, la insulo Ŝikokuo estas ankaŭ nomata “ganta insulo”, ĉar gantoj estis unu el ĝiaj ĉefaj industrioj dum la lasta jarcento. Laŭ s-ro Miyoshi, tuj post la dua mondmilito, en Ŝikokuo estis 300 gantokompanioj – nun restas ĉirkaŭ sesdeko, kaj 90% de iliaj produktaĵoj estas farataj en Ĉinujo. Kurioze, la prezoj de gantoj tute ne ŝanĝiĝis en la lastaj kelkdek jaroj – simple nun, por atingi la saman prezon, oni devas produkti en Ĉinujo... aŭ malaperi. Ironie, la translokiĝo de fabrikoj de Ŝikokuo okazas pro la sama kialo, pro kiu Ŝikokuo mem siatempe fariĝis la “ganta insulo”: malmultekosta laboro... Plus – amo!

Kial amo? Mi tuj klarigos! Iam, meze de la dek-naŭa jarcento, bela junulino el nobela familio enamiĝis al malriĉa bonzo. Ŝia familio ne volis tiun geedziĝon, kaj la amantoj do sekrete

geedziĝis kaj fuĝis al la urbo Osako. Tie ili lernis la gantan metion kaj heredigis ĝin al sia filo, kiu fariĝis granda industriisto, kaj translokis la fabrikon al Ŝikokuo. En la fino de la 19-a jarcento, ŝipoj inter Ŝikokuo kaj Osako iris ĉiutage: de Osako por transporti krudajn materialojn, kaj de Ŝikokuo por alporti pretajn gantojn. Do, eble pro tiu bela am-historio dum multaj jardekoj oni produktadis la gantojn... kun amo! La diverseco de la gantoj en la muzeo estas neimagebla. Mi trovas tre interesaj iujn longajn kontraŭsunajn gantojn, kiuj kovras la tutan brakon, lasante nekovritaj nur la pintojn de la fingroj: virinoj portas tiajn gantojn somere, por ne sunbruniĝi (kuriozaĵo por la eŭropanoj/nord-amerikaninoj, kiuj ŝatas esti sunbruniĝintaj!).

En Swany

Lerninte la gantan teorion en la muzeo, ni iras viziti la oficejon de Swany por vidi, kiel ĉio funkcias en la praktiko. Gantoj ne estas la sola produktaĵo de Swany – alia ĝia produkto estas la *walkin' bag* (“promensako”) – bastonvalizo, inventita de Etsuo mem: malsaniĝinta je poliomjelito infanaĝe, li ĉiam mem promenas kun du bastonvalizoj de Swany. Bastonvalizoj estas ne nur pli belaj kaj pli diskretaj ol kutimaj promenbastonoj, sed ankaŭ tre praktikaj: ili ja ankaŭ uziĝas por aĉetumado! Eĉ se *walkin' bag* eniris la merkaton antaŭ ne tiom longa tempo (en 2000), kun nur 25% el ĉiuj produktaĵoj de Swany (la ceteraj 75% estas gantoj), ĝi tamen donas 75% de la tuta profito.



Ne plantoj, sed *gantoj!*

Nun estas malfacile kredi, ke s-ro Miyoshi devis defendi la ideon de bastonvalizo, al kiu kontraŭstaris ĉiuj tiamaj estraranoj de la korporacio. (Etsuo rimarkas kun bedaŭro, ke li devis maldungi ilin, simple por povi antaŭenigi tiun ideon.) Fakte, tiu lia inventaĵo servas ankaŭ al sukceso de Esperanto, ĉar Etsuo rezignis la rajtojn je ĝi favore de la korporacio, kondiĉe ke li povu uzi 10% de ĝia neta profito por Esperanto. Estas danke al tiu aranĝo ke li povas publikigi tut-paĝajn reklamojn pri Esperanto en ĉefaj eŭropaj gazetoj, kaj nun organizas la premion *Cigno* por verkado pri Esperanto.

En la japana oficejo de Swany laboras iom pli ol cent personoj. Tie oni faras prototipojn de gantoj (laŭ Etsuo, lerni la gantofaradon daŭras kvin jarojn), kaj poste produktas ilin en Ĉinujo. Ricevinte jam pretajn gantojn, oni zorgeme kontrolas ĉiun paron por ĉiuspecaj difektoj: unue, oni pasigas gantojn tra du metaldetektilojn (por certigi, ke ne estas lasita peco de rompita kudrilo), kaj poste kontrolas ĉiun paron permane. En la japana oficejo de Swany oni ankaŭ dezajnas la bastonvalizojn (ofte kunlaborante kun eksteraj dezajnistoj el Tokio), distribuas, kaj riparas rompitaĵajn valizojn. La valizoj venas kun unujara garantio, kaj s-ro Miyoshi tre fieras, ke oni riparas kaj resendas la valizojn ene de nur unu semajno, je la granda ĝojo de la klientoj.

La oficejo de s-ro Miyoshi estas malgranda kaj

modesta — simpla labortablo dividita de eta negocotablo. Tie angule staras granda leda valizo, kiu helpis al li dum longaj vojaĝoj kaj kiu fakte inspiris lin inventi la bastonsakon *walkin' bag*. La dezajno de bastonvalizo multe ŝanĝiĝis ene de ĝia dekjara historio. Se la plej fruaj versioj estas pli similaj al apogaj vojaĝvalizoj, nun ekzistas malgrandaj bastonsakoj kaj eĉ tute etaj bastonmansakoj. Jen matematika demando. Kiel eblas, ke virinoj, estante ĉ. 50% de la loĝantaro, aĉetas 70% de ĉiuj bastonvalizoj? Tre simple! Se viroj aĉetas nur unu bastonvalizon, virinoj aĉetas du, tri aŭ pli, malsamkolorajn kaj malsamstilajn. Iu virino aĉetis dekon da ili en unu fojo, fiere rakontas Etsuo.

“La kliento estas la reĝo”

Mi ofte aŭdis pri la estroj de kompanioj, kiuj legas ĉiujn leterojn, sed tio estas la unua fojo, kiam mi renkontas tian homon! En ĉiu vendata valizo troviĝas poŝtkarto kun eta enketilo kaj instigo sendi la komentojn al Swany, kiu ricevas ĉirkaŭ 7000 tiajn poŝtkartojn jare. S-ro Miyoshi persone legas ĉiujn el ili, kaj eĉ mem respondas, se estas demandoj. Tre ofte uzantoj simple dankas pro tiu ĉi inventaĵo, kaj foje ili sendas valorajn proponojn: ekzemple, la bastonmansako estis unu el tiaj proponoj. Foje homoj skribas simple, ĉar ili sentas sin solecaj kaj rakontas pri malfacilaĵoj de sia vivo... Iam – vi povas ridi aŭ plori! – unu virino skribis, ke ŝia edzo mortis en aŭtoakcidento, kaj petis helpi al ŝi... trovi novan edzon!

Eĉ se Swany ne povis helpi pri tiu specifa peto, la kompanio (kiel ĝenerale en Japanujo) tre fieras pri la bonega servo al klientoj. Se venas demandoj, oni provas respondi tuj: iu kliento eĉ sendis ĉokoladon, kiam ene de tri tagoj li ricevis respondon al sia demando. Kaj unu persono eĉ venis el Tokio por danki la riparan departementon, ĉar, forgesinte skribilon en la sako, li rericivis ĝin kun aldonita letero. Estas ĝuste la klientoj (ĉi-foje, vendistoj), kiuj instigis la kompanion ŝanĝi la aspekton de bastonvalizoj – ili trovis la originalan nigran stilon ne tre bela. Ĉar s-ro Miyoshi mem dezajnis la valizojn komence, estis malfacile gluti tiun komenton, “Sed kion fari

? – la kliento estas reĝo”, li diras, ridetante.



Kelkaj el la bastonsakoj, kiujn inventis s-ro Miyoshi – kaj kiuj helpas lin reklami Esperanton.

Kobeo de sur la “tambura turo”

De Ŝikokuo ni revenas al Honŝuo por viziti la havenan urbon Kobeo, kie, same kiel en ĉiuj vizititaj lokoj, nin atendas esperantistoj. Ni faras la rondon tra la urbocentro per rapidega senŝofora unurelvojo, kie mi ne povas rezisti la tenton fotiĝi ŝajnigante min ŝoforo.

Kobeo estas tre malĝoje konata pro la terura tertremo de 1995, en kiu mortis pli ol ses mil personoj. Ĝi frapis frumatene, kiam multaj homoj ankoraŭ estis en la lito... La monumento al la mortintoj dum la tertremo, kun la nomoj de ĉiuj viktimoj, estas la unua loko, kiun ni vizitas. Same kiel en Hiroŝimo, ni vidas la striojn de kunplektitaj paperaj gruoj. De la fama 90-metra “tambur-turo” – simbolo de Kobeo – ni povas


vidi la tutan urbon ĉe la montaro kaj la havenon, kie troviĝas grandaj ŝip-farejoj de la du japanaj gigantoj: Kawasaki kaj Mitsubishi.

Tiu ĉi haveno estis plene rekonstruita post la tertremo, sed oni lasis, kiel rememoraĵon, kelkajn partojn de la kajo, tute torditajn pro la tertremo. De la supro de la turo ni ankaŭ vidas tri(!) kristanajn preĝejojn. Du estas sur la tegmentoj de hoteloj. Nu, ne temas pri veraj preĝejoj (almenaŭ ne tiuj sur la tegmentoj) – sed pri specialaj preĝejoj, kie okazas geedziĝoj, ĉar japanoj tre ŝatas la aspekton de okcident-stila geedziĝo (tiom ordinara por ni en Nord-Ameriko!). Ankaŭ la reklamoj pri kristan-stilaj geedziĝ-servoj estas ĉie. Mi ne povas ne ŝerci, ke mia edzo Joel, kiu tiom ŝatas religiojn, maltrafis belan karieron kiel falsa eŭrop-aspekta pastro en Japanujo!



Parto de la haveno de Kobeo.

(Sekvos kvara parto venontnumere. –Red.)



Jenja AMIS

Naskita en Kievo, Jenja pasigis kvin jarojn en Atlanto kaj nun loĝas en Montrealo. Ŝi dum jaroj redaktis la revuon *Kontakto*, kaj nun ŝi laboras por la fonduso *Esperantic Studies Foundation*.

<jevgeniya.amis@gmail.com>

Considering the languages students already speak

D. Gary GRADY

It's possible to teach a foreign language without taking into account the languages one's students already know. Proof of that is Andreo Cseh's brilliant success in teaching Esperanto by the direct method, often to students who spoke languages he didn't know — and who sometimes didn't know one another's language.

That said, the language(s) a student already speaks can hinder or help learning a new language, and the nature of that help or hindrance depends on the languages in question. So when possible, a student's language background is something a language teacher might want to consider.

A student can get a head start, especially in vocabulary, from acquaintance with a language related to the language being studied. For example, Esperanto students who already know some English, French, Spanish, Latin, German, or another Germanic or Romance language (and to some extent a Slavic one or Greek) will find many familiar roots in Esperanto.

Esperanto students in the U.S. typically speak English, so teachers can take that into account when designing a course's vocabulary. Words with close English equivalents are easy to figure out when reading or listening. They're also easy to think of when speaking or writing, which is of practical importance especially at the start when a limited vocabulary can be very frustrating. True, students shouldn't be misled into thinking they can just append an Esperanto ending onto an English word, nor should they be encouraged to speak a form of Esperanto too heavily influenced by English. But those are problems that need to be dealt with anyway — so why not take advantage of a student's existing knowledge?

Have some of the students already studied a language other than English? At a minimum, that

means they've had exposure to the basic ideas of learning a foreign language. If they've studied a major European language, so much the better. For one thing, that increases the number of Esperanto roots they're likely to find familiar. It also means there's a good chance they're familiar with some of the "false friends" they'll meet — words that look familiar, yet have a different meaning from what one might expect. For example, students who already know that the French word *actuelle* doesn't mean "actual" are more likely to guess the correct meaning of *aktuala* in Esperanto.

Unfortunately, as the concept of "false friends" implies, knowing another language can also hinder as well as help. Possibly the hardest thing about learning a new language is making distinctions that exist in that language but not in your native tongue. If you already know a second language that also doesn't make the distinction, it's even more confusing.

For example, Russian has no articles (no equivalent for English *the*, *a*, or *an*), so native Russian speakers sometimes have trouble knowing when to use an article or leave it out. Some languages have separate pronouns by gender. English and Esperanto make the distinction only in the third person singular, and Finnish and Chinese have no pronoun gender at all — all of which must be kept in mind when teaching a language that makes such distinctions to speakers of other languages that don't have them. The same problem crops up with simple vocabulary, such as the difference between *nombro* and *numero* in Esperanto, which are both usually translated as "number" in English.

(For that matter, I'd hate to tell you how old I was before I glommed onto the fact that the English homophones "discreet" and "discrete" are distinct words. Being a native speaker of language is no guarantee that you know its subtleties.)

The word *that* in English is very often equivalent to *que* in Spanish, but in Esperanto the correct translation is sometimes *ke...* but sometimes *kio* or *kiu* (or for that matter *kion* or *kiun*). A student in the habit of robotically replacing *that* with *ke* will be all right translating *I hope that you will phone* as *Mi esperas, ke vi telefonos*, but not when translating *the thing that I want* as *tio *ke mi volas* rather than *tio, kion mi volas*. At other times the tendency to omit an explicit *that* before a subordinate clause in English (as in *I hope you will phone*) may cause a student to leave out a necessary *ke* in Esperanto entirely.

When teaching, it makes sense to try to anticipate these problems and head them off, both by giving students a lot of examples of correct usage and by explicitly warning them away from common errors. This might be a particularly good place to make use of translation exercises, having students translate the very sort of expressions most likely to lead them astray. The purpose isn't to encourage them to get things wrong (though I wouldn't put that past some of the teachers I've had) but to learn what to watch out for.

Of course, the most basic way one's native language influences learning of other languages is probably in the area of pronunciation. (Granted, that's not so much a concern when studying the written form of a language, but nowadays even Latin and Ancient Greek tend to be taught with some emphasis on speaking.) If you've ever taught Esperanto in a classroom or other in-person setting, odds are that you've taught pronunciation from the first class, so there's no need to belabor this.

One point that might still be worth mentioning, however, is that current practice is not to worry too much about developing a perfect accent from Day One. If, for instance, students aspirate their unvoiced stops — emit a subtle *H* sound after *K*, *P*, and *T*, as speakers of English (and for that matter Polish) are apt to do — that's not a serious problem. It's much more important to discourage mistakes that are more likely to interfere with communication, such as reducing unstressed vowels to *ih* or *uh*, as we're inclined to do in

English. (I've suggested having students address this by watching *Star Trek II: The Wrath of Khan* and imitating Ricardo Montalban [<http://youtu.be/klyiR5CQYqQ>], but nobody else seems to think this is as grand a pedagogical idea as I do.)



Khan's impressive vowels never failed to charm the ladies of Ceti Alpha VI.

Instructors used to worry that students who didn't develop a good accent early on would have trouble overcoming their initial bad habits. In fact, students can and do improve pronunciation, grammar, and so on gradually over time, and it's more important for them to get a lot of practice using the language, even imperfectly, than to get it right from the start, and perfectionism is likely to interfere with that. In Esperanto this isn't a new idea. Most beginning Esperanto courses don't even mention aspirating stops, let alone try to discourage it, and no less an Esperanto teacher than Zamenhof himself suggested that speakers of Slavic languages simply ignore the definite article *la* when starting out.

A brief *ĝis revido*:

Since I'm involved with this year's *Landa Kongreso* in Raleigh I'm taking a vacation from this column for at least a few months. Writing it has been an enjoyable experience and I'm grateful for the kind words and helpful suggestions you've sent in, and in particular would like to thank our editor for putting up with my deadline-pushing habits and for correcting my numerous typos and worse.


Iudoj

Spot It!: simpla kartludo

Russ WILLIAMS

Spot It! (ankaŭ aperanta sub la titolo *Dobble*) estas rapida, amuza kartludo kun tre simplaj reguloj. Ĝi do bonas por esperantaj renkontiĝoj.

La ludo konsistas el 55 cirklaĵ kartoj en sufiĉe fortika ronda metala skatolo, do ĝi estas facile portebla por vojaĝoj. Ĝin aŭtoris Denis BLANCHOT. Origine eldonis ĝin la franca eldonejo Asmodee, sed ĝi jam aperis en multaj landoj en diverslingvaj eldonoj.



En *Spot It!*, ĉiuj du kartoj havas precize unu bildon komunan.

Ĉiu cirkla kartoj havas ok bildetojn – ekz. suno, luno, hundo, fulmo, drako, ktp. La kartaro havas interesan matematikan econ: por ĉiu paro da kartoj, ekzistas precize unu komuna bildo sur ambaŭ kartoj. La bildoj ĉiam aspektas same laŭ formo kaj koloro, sed ne nepre laŭ grandeco! La ludado temas pri rapida, realtempa rekonado de la komuna bildo sur paro da kartoj. Efektive la ludo enhavas regulojn por kvin malsamaj ludoj,

sed ĉiuj baziĝas sur tiu sama principo: profitas tiu, kiu unue vidas komunan simbolon.

En la komenca versio, ĉiu havas propran stakon de kartoj, kaj estas stako en la mezo. Ĉiuj ludantoj realtempe trovas komunan bildon sur la propra kartoj kaj la centra kartoj, trovinte, rapide metas la propran karton sur la mezan stakon – tiel ke la propra stako kaj la meza stako nun montras novajn kartojn. La celo estas plej rapide forigi ĉiujn kartojn al la mezo. Do oni devas rapide serĉi kaj rekonu kaj elparoli, kaj la ludo ne plaĉos al tiuj, kiuj ne ŝatas tiajn realtempajn rapidajn ludojn.

La ludo utilas por lingvolernantoj; plejparte la bildoj montras sufiĉe ĉiutagajn aĵojn, kiujn komencanto aŭ progresanto devas lerni. Ofte pli ol unu priskribo tute validas kaj venas nature al la kapo. Ekzemple, priskribo de unu bildo povas esti “ruĝa folio” aŭ “acero” aŭ “acera folio” aŭ “kanada folio”; por alia, konvenas “ŝako” aŭ “ŝakpeco” aŭ “ĉevalo”. Do estas bone, se oni povas elturniĝi kaj improvizi se iu vorto malaperas de la cerbo – ĉiam eblas iel koncize priskribi la bildon.

Kompreneble tia ludo utilas por lernantoj de ĉiu ajn lingvo. Mi ankaŭ ludis ĝin angle kiel angla instruisto kaj pole kiel pola lernanto. Ankaŭ tute eblas ludi ĝin plurlingve – ĉiu ludanto simple eldiru la bildon en kiu ajn lingvo venas plej konvene al ŝ/lia kapo. (Vere eĉ ne necesas, ke ekzistu komuna lingvo inter ĉiuj ludantoj.)

Miasperte, la ludo tre konvenas dum paŭzoj inter programeroj en Esperantaj aranĝoj, ĉar oni povas rapide facile klarigi la regulojn kaj same rapide ludi: partio finiĝas en malmultaj minutoj. Kutime homoj petas ludi denove, do ni ludas kelkajn fojojn en serio.

Mi trovis, ke la ludo ankaŭ instigas diskuton inter matematikemuloj, ĉar la interesa matematika strukturo de la kartaro (ĉiu paro havas precize unu komunan bildon) vekas scivolon pri kiel oni

garantias tiun econ, kaj kiom da malsamaj bildoj sume necesas por ke kartoj kun ok simboloj havu tiun econ, ktp.

Unu ĝeneta afero estas, ke efektive eblas krei 57 kartojn kun ok simboloj kaj tiu eco, sed pro amasproduktaj kialoj, estas pli ekonomie presi kartojn 55-ope, do mankas du kartoj el la “kompleta” teoria aro. Sed tio ne havas praktikan efikon sur la ludado, do estas nur interesaĵo por la matematikemuloj!

Al homoj, kiuj ĝuas rapidajn realtempajn ludojn kaj ŝatas havi ion etan kaj simplan por porti dum Esperantaj aranĝoj kaj aliloke, mi rekomendas la kartludon *Spot It!*

Eldonejo: Asmodee. Pliaj informoj estas haveblaj ĉe BoardGameGeek [<http://boardgamegeek.com/boardgame/63268/spot-it>].



Russ WILLIAMS

Antaŭe de Aŭstino, Teksaso, Russ loĝas en Vroclavo, Polujo kun sia edzino Anna SKUDLARSKA. Ili esperantumas kaj tabulludas obsede.

<cxiomortas@gmail.com>

enigmo-solvoj

Solvo de n-ro 2012:5

En numero 2012:5 Vilĉjo HARRIS prezentis enigmon el la libro *Gimnastiko por Cerbo de TACUMI Hiroshi*, havebla ĉe la libroservo. Jen la solvo.

La problemo ŝajnas komplika se oni provas sumigi la distancojn en ĉiu rondiro de la hundo. La homo konstante promenas, do la distanco inter homo kaj stacio konstante ŝanĝiĝas, kaj ĉiu rondiro de la hundo estas malpli longa ol la antaŭa.

La hundo tamen kuras pli rapide ol la homo, kaj ĝi kuras nur inter la homo kaj la stacio, do ili ambaŭ nepre atingos la stacion samtempe.

Konstatinte tion, ni povas solvi la problemon pli simple. Anstataŭ provi sumigi la distancojn de pluraj rondiroj, ni povas atenti nur du faktojn: la daŭron de la promeno de la homo, kaj la rapidecon de la hundo dum tiu daŭro:

- La promeno de la homo daŭras duonhoron: 2 km (la distanco inter la domo kaj la stacio) dividita per 4 km/h (la rapideco de la homo) = 1/2 horo.
- Dume, la hundo kuras konstante je 20 km/h. Tial la tuta distanco, tra kiu la hundo kuras, devas esti: 20 km/h x 1/2 h = **10 km**.

